



Estrara Komunikado EKO 2015-44 sendita el Budapeŝto la 13an de oktobro.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, la E-gazetaro kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj (petu senpagan ricevon!).

Ukrainio ricevas atenton de UEA

La vic-prezidanto de UEA faris viziton kvintagan al sia najbara lando. Li komentis: “Ege utila kaj impresa vizito. Multon mi spertis kaj lernis. Bonegis la prizorgo por naiva antipodano reganta neniun slavan lingvon”. La rondiro ampleksis du tagojn en la ĉefurbo Kijiv, du en Lucjk kaj vespero/nokto en Lviv. Konstateblas multaj spertaj esp-istoj, alta lingva kaj literaturkona nivelo kaj aktiva intereso pri lingvaj temoj. Ekzistas junulara agado.

Kijiv (pop. 3-5 milionoj): Renkontiĝo kun dekdu da klubanoj diversaĝaj en bona sidejo, dividata inter kelkaj socie agantaj asocioj. Ili aŭskultis pri UEA, per lumbildoj ekkonis la AMO-programon, inkluzive de tiu ĵarfine en Eger, kaj starigis multajn demandojn. Ukrainoj deziras partopreni en la UK en Nitra. Sekvatage parlamenta biblioteko,



kun gvido tra la sekcio pri raraj libroj kaj la sekcio pri fremdlingvaj libroj kaj revuoj - 37 lingvoj sed nenio en la hungara. Ekzistas tie sekcio de E-libroj. Starigota kunlaboro inter tiu biblioteko kaj tiu en Budapeŝto, kiu same havas kolekton da E-libroj. Utilaj kontaktoj arigitaj, oni registris tri video-prezentojn, unu pri la AMO-programo. Komputike kapablaj junuloj estas – ekzistas tre ampleksa Eo-ukraina vortaro legebla ankaŭ en poŝtelefonoj kun funkciiga sistemo *Android*. Ĝi estas libere elŝutebla el interreto.



Lucjk (pop. 220 mil): Neatendite produktiva vizito, pro bonega universitata laboro – Nina Daniljuk estas katedrestrino pri romanidaj lingvoj kaj interlingvistiko. Unue, afabla neformala akcepto 45-minuta ĉe la dekanino pri fremdlingva filologio, d-ro Rogach Oksana, kun paroloj ukrainaj, anglaj kaj en Esperanto (vidu la foton, de maldekstre: (Lineckij, la dekanino, MacGill, Daniljuk, Hriŝĉenko). Poste,

neatendita renkontiĝo ĉe festotablo kun deko da instruistoj el la katedro (vidu la foton). Ili starigis multajn demandojn; ĉe ili trafis pozitivan akcepton la mesaĝo, ke esperantistoj estas por komunika justeco kaj multlingveco – ili ja sentas siajn postenojn sub minaco de la invadanta angla. Poste renkontiĝo kun ĉ. 35 studentinoj de la fakto (ĉ. 18-jaraj, ĉiu krom du inoj). Du studentoj legis prelegon pri



Eo, Nina Daniĵuk prezentis pri la historio de Eo en tiu universitato kaj pri E-vojaĝoj, i.a.en Lillo. La subskribinto prezentis tre skize nian asocion kaj montris la lumbildojn pri AMO, transsaltante la tekstajn partojn. Foto sube. Venis kelkaj interesiĝoj.

La lasta sesio estis neatendita sed ege pozitiva. Rakontas Stefan MacGill: 'La dekanino invitis min al sia prelego (kutime

en la ukraina) pri kompara kaj teoria lingvistiko. Ŝi prezentis min angle al la dudeko da iom pli aĝaj studentoj, kaj mi parolis al ili angle pri la unikaĵoj de Esperanto, pri komunika demokratio kaj lingva alternativo. Tio vekis eĝan intereson. Mi provas paroli klare en tiuj situacioj, sed mi ne komptis ilin per malrapidiĝo. Eĉ tiel, mi vidis, ke ili komprenas min kaj montras konsenton, kiam mi diras aferojn pri kiuj facilas konsenti. La dekanino nutris min per saĝaj demandoj, do la tuto procedis kiel dialogo kaj ne prelego. La tuto daŭris nur 20 minutojn, sed mi taksis tion ege pozitiva, eĉ altpinto de mia vizito'. En la fakultato estas ĉambretoj por multaj lingvaj centroj kaj unu pri Esperanto. Deko da lokaj esp-istoj tie kunvenis, ni babilis kaj ni notis dezirojn kaj vidpunktojn. Tie restis dekkvino da libroj kaj revuoj *Juna Amiko* kaj *IPR*, kiel simile okazis en Kijivo. La librojn donacis Hungaria Esperanto-Asocio al UkrEA kaj ĝiaj filioj. UkrEA donace disponigis librojn por HEA. Praktika tasko, kiun la vic-prezidanto alprenos kunlabore kun ILEI: formi universitatan komisionon komunan inter UEA/CED kaj la instruistoj por pli efike kunordigi universitatan kunlaboron.



Lvivo (pop 0,7 – 1 miliono). Renkontiĝo kun lokaj esperantistoj (deko) kaj urborigardado. Nur kelkminuta prezento pri UEA kaj la AMO-programo kaj tiu en Eger. Ili celas starigi en tiu urbo internacian renkontiĝon, komence de majo 2016.

Vortoj: 640. Ĉiuj fotoj: fotilo de SMG. Jen vidbendoj registritaj de Andreo Jankovskij en la parlamenta biblioteko en Kijivo:

Pri la AMO-programo: <https://www.youtube.com/watch?v=WFV-OuhGcg0>

Pri la bazaj laboroj de UEA: <https://www.youtube.com/watch?v=FTYImq5ScwY>

Skizo de la persona vivo de Stefan MacGill: <https://www.youtube.com/watch?v=KCSbKK1BLvw>

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiče 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Por vidi pli malnovajn komunikojn iru al: www.uea.org/vikio/Komunikado_kun_LA_FA...